Zamenhof-Jaro 2017: kial memori datrevenon?

Sara Spanò
nome de la teamo Z-100

Memoro pri datreveno povas ofte esti interpretate kiel teda aŭ eĉ senutila afero, tute nerilata al la nuntempo; retrorigardon oni povas foje difini forfuĝo al pasinta kaj ne plu retrovebla "ora epoko". Tamen, ĉefe en nia freneze brua kaj rapidritma epoko, halti momenton, rigardi malantaŭ ni kaj dediĉi tempon al rememoro havas gravan signifon; prikonsideri nian historion estas maniero por plifortigi nian komunuman senton, laŭbezone reorienti nian agadon, kaj fine por plenfide rigardi al la estonteco, danke al nova inspiro kaj revigligo de nia agadema elano.

Celebri la Zamenhof-Jaron 2017 estas multe pli ol silenta kolektiĝo ĉirkaŭ monumento; temas pri iniciato kiu tuŝas ĉiujn agadkampojn, kiu havas la grandan potencialon renovigi forton kaj instigon antaŭeniri por antaŭenpuŝi niajn idealojn. Jen trarigardo pri la diversaj agadoj rilataj al la Zamenhof-Jaro 2017, laŭ la kvar ĉefaj agadkampoj de UEA: Kunordigo, Konsciigo, Kapabligo, Komunumo.

Laŭ la kunordiga vidpunkto, la unua ago estis krei gvidan teamon pri la Zamenhof-Jaro: en ĝi ĉiuj agadkampoj estas reprezentataj, ĉar tiom grava kaj ampleksa agado postulas konojn kaj energiojn de pluraj homoj, plurkampe engaĝitaj. La kunrespondecaj estraranoj Emilio Cid (Informado) kaj Sara Spanò (Eksteraj Rilatoj, Aktivula Maturigo, Kulturo), la komisiito pri la Z-Jaro Barbara Pietrzak (eksa estrarano de UEA pri Kulturo, engaĝita en la priaj agadoj en Pollando kaj kolono de la priaj radio agadoj), en daŭra interkonsiliĝo kun la Prezidanto de UEA Mark Fettes kaj la Ĝenerala Direktoro Veronika Poór, antaŭenigas la iniciatojn rilatajn al la grava centjariĝo okazonta en 2017. Aldonindas ke, pro la graveco de la 102-a UK en Seulo kaj la engaĝiĝo de la Esperanto-Centroj en la projekton, nia estrarano Jungkee Lee havos aktivan rolon en nia teamo, balancatan ankaŭ laŭ la landagadaj (kun)respondecoj.

Jam dum la oficiala lanĉo de la Zamenhof-Jaro okazinta dum la 101-a Universala Kongreso en Nitro, kaj poste danke al la aktivigo de komuna retadreso *zamenhofjaro100@gmail.com* kaj al la kreo de rilataj kategorioj en la forumo de UEA alvenis novaĵoj pri pluraj iniciatoj el diversaj mondopartoj. Per tiu ĉi ago en la komunikada kampo ni ne intencas nur informi, sed ankaŭ kaj ĉefe enplekti pli kaj pli da kunlaborantoj en la agadon kaj kuraĝigi al reciproka informfluo inter UEA, Landaj Asocioj, lokaj kluboj, Esperanto-Centroj, pri la celebrado de la Zamenhof-Jaro, cele al konstruado de komuna mapo de eventoj rilataj al la datreveno, laŭ la modelo kutime uzata de Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko okaze de solenata internacia tago aŭ jaro. Regula instiga agado pere de la Gazetaraj Komunikoj de UEA, de la revuo *Esperanto* kaj de aliaj retaj komunikkanaloj (inter kiuj nepre menciindas la Estraraj Komunikoj prizorgataj de la vicprezidanto de UEA, Stefan MacGill) estas planata ekde nun ĝis la fino de la jaro 2017.

Konsciigi la eksteran publikon kaj la internaciajn instituciojn pri nia idearo kaj pri la iniciatinto de Esperanto estas unu el la ĉefaj celoj de la celebrado de la Zamenhof-Jaro.

La historio mem de la proklamado de la Zamenhof-Jaro reprezentas tre bonan deirpunkton. Menciindas, ke dum la 38-a sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko okazinta en novembro 2015, estis oficiale akceptita listo de datrevenoj celebrotaj sub la protektado de Unesko en 2017. Inter 53 datrevenoj proponitaj de organizoj en oficialaj rilatoj kun Unesko, enviĉiĝis la 100-a datreveno de la forpaso de L.L. Zamenhof (okazonta la 17-an de aprilo 2017). La propono, prezentita de Pollando, estis subtenita de Germanio kaj Slovakio.

Ĉe la sekcio pri celebrindaj jubileoj en 2017, oni povas legi ke "La Esperanto-movado, kiun li iniciatis, disvastiĝis tra la tuta mondo, dum li kiel ĝia kreinto rezignis pri ĉiuj siaj rajtoj, liberigante Esperanton por ĝia utiligo de ĉiuj homoj. La verko de L. Zamenhof estas konata tutmonde kaj atingis pli ol 120 landojn. La ideo de komuna lingvo jam fascinis multajn homojn, kaj multaj simile provis krei ĝin, sed nur ĉe Zamenhof oni atingis tutmondan sukceson". Pli da detaloj legeblas ĉe: *http://en.unesco.org/celebrations/anniversaries/2017/all?page=1*

Unu el la planoj por konsciigi la eksteran publikon pri la graveco de la figuro de Zamenhof kaj lia idearo estas starigi retejon por esperantistoj, kie aperos novaĵoj pri eventoj en la tuta mondo, alvokoj kaj konsiloj por agado, kaj ankaŭ plurlingvan retejon por la ekstera publiko, kun informoj pri la iniciatinto de Esperanto, kaj ankaŭ pri Esperanto ĝenerale, pri utilaj priaj lerniloj, kaj pri temoj kiuj reprezentas komunan agadterenon inter nia Movado kaj aliaj organizoj (ekzemple, lingvaj rajtoj). Nepre vizitadu nian forumon *http://forumo.esperanto.net/index.php?board=30.0* por legi novaĵojn pri la temo. Aldone al la retejoj, ni intencas krei plurlingvajn informilojn, emfazante la datrevenon agnoskitan de Unesko, la ĝisnunajn atingojn de UEA ĉe Unesko, kaj - laŭ la celgrupo - la junaĝon de Zamenhof ĉe la fondo de sia projekto pri lingvo internacia. Ni kuraĝigas – laŭ la imitinda ekzemplo jam donita de pluraj Landaj Asocioj dum la lanĉo de la Zamen-

hof-Jaro en Nitro – kontaktadon kun la naciaj Unesko-komisionoj, kaj la okazigo de eventoj kaj prezentoj dediĉitaj al Zamenhof kunlabore kun la menciitaj institucioj.

UEA estas konstante reprezentata ĉe tri sidejoj de Unuiĝintaj Nacioj (Ĝenevo, Novjorko, Vieno) kaj ĉe la sidejo de Unesko; tial, okaze de la Zamenhof-Jaro, estas planataj simpozioj ĉe ĉiuj menciitaj sidejoj en 2017. Estas krome aparta plano pri gazetara/amaskomunikila kampanjo ligita al samtempa tutmonda memorcelebrado ĉe tombejoj de famaj esperantistoj kaj/aŭ ĉe Zamenhof-Esperanto-Objektoj (laŭeble ĉirkaŭ la 17-a de aprilo 2017, paralele laŭ la diversaj tempozonoj al la ceremonio ĉe la tombejo de Zamenhof) por konsciigi la internan kaj eksteran publikon kaj la amaskomunikilojn pri la aktualeco de la idearo de Zamenhof. La ZEOj ludos gravan rolon, kaj en la konsciiga kaj en la komunuma agadkampo.

La natura kulmino de la konsciiga agado estos la 102-a Universala Kongreso en Seulo, dum kiu estas planata okazigo de solenaj kaj videbligaj momentoj kunlabore kun lokaj instancoj kaj bonvenigo de kulturaj kaj artaj prezentoj ligitaj al Zamenhof malfermaj al la ekstera publiko. La konsciiga agado rimarkinde interplektiĝas kun la kapabliga agado, ĉar informado kaj eksteraj rilatoj estas inter la plej tiklaj kaj prestiĝpostulaj agadkampoj, kaj ili vere koncernas ĉiujn aktivulojn je ĉiuj geografiaj agadniveloj (loke, lande, internacie). Por helpi la aktivulojn kiuj deziras kontakti ekzemple la Unesko-komisionojn kaj la lokajn instancojn kaj bezonas sugestojn pri tio, kiel taŭge moviĝi dum la diversaj ŝtupoj de la kontaktado, estas planata publikigo de sintezaj konsilaroj pri eksteraj rilatoj kaj informado en la revuo *Esperanto*, sub la formo de "kapabligaj artikoloj", poste enretigotaj kaj disponeblaj kiel trejnmaterialo.

Strategie aparte grava estos serio da AMO-seminarioj pri eksteraj rilatoj kaj informado en la urboj kie situas la ĉefaj sidejoj de internaciaj instancoj kie UEA estas reprezentata (Unuiĝintaj Nacioj, Unesko) kaj kie ofte okazas ankaŭ informaj agadoj kadre de internaciaj aranĝoj. Paralele, disvolviĝos serio da AMO-seminarioj en diversaj mondopartoj, kun sekva disponigo de konsilaroj kaj trejnmaterialoj pri eksteraj rilatoj kaj informado, ekzemple pri tio, kiel kontaktiĝi/interrilatiĝi kun urbestroj, Unesko-komisionoj, registaraj reprezentantoj; kiel starigi bonan kontakton kun la gazetaro; kiel alparoli homojn surstrate dum surstrata/informbuda informkampanjo. La celo estas disponigi la bezonatajn konojn kaj plifortigi la bezonatajn kapablojn por profesinivele alfronti la kernajn agadkampojn ligitajn al la ĉapitro Konsciigo.

Laste, sed ne malpli grave, elstarigindas la komunuma flanko: la Zamenhof-Jaro havas inter siaj plej gravaj celoj la plifortigon de nia komunuma sento, danke al inspira retrorigardo al la pasinteco. Tiucele, okazos enplektigo de la reta komunumo (Duolingo-lernantoj/lernintoj, grupoj ĉe Facebook kaj Telegram), valoriginda virtuala baseno kie tutmonde agadas kreemaj kaj viglaj aktivuloj.

La kleriga agado estos plurflanka: prezentoj okazigotaj je pluraj niveloj (kuraĝigante al filmado kaj/aŭ sonregistrado, tiel ke ili facile estu diskonigeblaj rete) kaj serio da fakaj artikoloj pri Zamenhof kaj la Z-Jaro en la revuo *Esperanto* estos du el la ĉefaj vigligindaj agadoj - ekzemple, lige al la celebrado de la alproksimiĝanta Zamenhof-Tago en decembro (menciindas ekzemple la tradicia aranĝo okazigata ĉiujare en Bjalistoko, la naskiĝurbo de Zamenhof).

La radia agado (kunlabore kun la koncerna komisiono) ludos kernan rolon (rilatan ankaŭ al konsciigo, laŭ la informada flanko), pere de prelegoj, intervjuoj, kleriga kaj inspira serio da programeroj pri Zamenhof (intervjuoj de fakuloj, prelegetoj, legado de ĉerpitaĵoj el la verkaro de Z), reklammesaĝoj kaj raportoj rilataj al priaj iniciatoj planataj/okazintaj en ĉiuj mondopartoj.

Gravan komunuman signifon havos la planataj samtempaj ceremonioj ĉe tomboj de famaj esperantistoj kaŭ ZEOj samtempe al la ceremonio en Varsovio ĉe la tombo de Zamenhof. La Universala Kongreso en Seulo, kies graveco jam estis citita en la agadkampo Konsciigo, havos gravan rolon ankaŭ en la ĉapitro Komunumo, kiel kerna etapo dum la jaro 2017 por plifortigi la komunuman senton.

Apartan rolon ludos la reto de la Zamenhof-Esperanto-Objektoj, jam cititaj pri la ideo lanĉi gazetaran kampanjon rilatan al tutmonda samtempa memorcelebrado. La ZEOj-reto havas grandan kaj eluzindan potencialon por nia komunumo, kaj ankaŭ gravan konsciigan valoron. La ĉefaj ŝtupoj estos la ampleksigo de la koncerna komisiono, laŭ la bezonataj kapabloj por atingi diversajn celgrupojn; la valorigo de la ZEOj-reto per aktualigo kaj videbligo de la ZEOj-listo; kampanjoj por atingi pliajn celgrupojn (ekzemple, geokaŝado kaj PokémonEk).

La agadoj estas ampleksaj, plurkampaj, kaj certe ne mankas spaco por kunlaborantoj: se vi deziras doni vian aktivan kontribuon, se vi havas pliajn kunhavigindajn ideojn, se vi deziras kunpartigi kun ni tion, kio planatas en via Landa Asocio aŭ loka klubo, bv. kontakti nian teamon ĉe *zamenhofjaro100@gmail.com*.